

### **Propono por protokolanto**

La estraro proponas ke la protokolanto de la komitataj kunsidoj de ILEI en Kopenhago estu s-ino Teresa Liberska. Ŝi estas invitita al la konferenco unuavice por prizorgi la praktikajn aspektojn de la komitatkunsidoj kaj simile helpi en ĉiuj ligaj laborkunsidoj dum la konferenco, kaj, interkonsente kun nia konferenca estrarano kaj LKK, asisti alimaniere en la konferencaj laboroj.

Teresa jam de kelkaj monatoj estas la ĉefa persono malantaŭ la adreso ilei.sekretario@gmail.com en Herzberg, kie ŝi laŭgrade kaj kun gvido de estrarano Zsofia Korody, transkonstruas la membroadministradon

kaj prizorgas aliajn sekretariecajn laborojn, kiel ekzemple mastrumado de la komitataj voĉdonoj kaj kompilo de la raporto pri la Landaj Sekcioj.

Teresa studis en la Ekonomia Universitato en Poznano, kaj poste tie plenumis postdiplomajn interlingvistikajn studojn. Kun laborlokoj en banko kaj memstara firmao, ŝi havas organizajn lertojn, kiuj estas tre valoraj por ILEI.

Necesas emfazi, ke Teresa ne estas kandidato por la sekretaria posteno, sed fariĝas nia ĉefa honorariato, kun perspektivoj resti pli longtempe en Herzberg kaj plenumadi helptaskojn por ILEI.

Tial ni opinias valora, ke la konferencanoj en Kopenhago havu eblon konatiĝi kun ŝi.